

SANO

JARKOLEKTO 1987

NUMERO 2

ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Medicinistaj informoj - SANO – jarkolekto 1987 – numero 02 - Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Cirkulero de medicinistoj, farmacistoj, geflegistoj kaj ruĝkrucaoj.

Eldonas: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, medicina sekcio, Jilská 10, Praha 1 – kvarfoje jare kiel aldono de asocia gazeto Starto

Redaktas: MUDr Josef Hradil, 29501 Mnichovo Hradiště 718, ĈSSR
Grafika kunlaboranto : Jiří Hanousek, Liberec

Presas: RUCH LIBEREC, ÚVTEI 85 027

KIAMANIERE ABONI NIAN CIRKULERON ?

La jarabono estas 10,50 nederlandaj guldenoj aŭ egalvaloro. Se vi ne povas aboni ĉe perantoj sube notitaj, skribu al ni. Vi povas mendi ankaŭ asocian gazeton STARTO, ĝian kulturen almanakon PANORAMO, diversajn niajn librojn, insignojn, glumarkojn kaj aliajn esperantaĵojn. Abonprezo en ĈSSR 24 Kčs, en socialismaj landoj egalvaloro de 36 Kčs.

PERANTOJ:

BULGARIO: Stojĉo CANKOV, p.k. 208, BG-7000 RUSE

ĈSSR: ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO, Jilská 10, 110 00 PRAHA

G D R : Margit Volkmann, Gubenstrasse 19, Zittaŭ, DDR-88

HUNGARIO: D-rino ISTVANE GAJZAGO, Karolyi Mihaly u. 41/B, 1053 BUDAPEST

JAPANIO : Saburo YAMAZOE, 371 Maebashi-shi, Iwagami-Machi 4/8/9 GUNNA-KEN

POLLANDO: STEFANIA WOJCIECHOWSKA, ul. Demokracji 10/10, PL-78-320
POLCZYN ZDROJ

SOVETUNIO: N. SIGAJEV, Posadskaja 18-3, SU-450014 UFA

UEA : UNIVERSALA ESPERANTO _ASOCIO. Nieuwe Binenweg 179, BJ 3015 ROTTERDAM,
NEDERLANDO

USA : BERN VHEEL, BOOKS, 834 WENOAH, Oak park, IL 60304

© ĤEMIIZO DE LA VIVOMEDIO KAJ LA HOMA SANO

MALUTILAJ GASOJ KAJ AEROSOLOJ

Ing. Zdeněk Pluhař

1. La ĉefaj fontoj kaj efikoj

Por niaj celoj ni difinu la terminon malutilaj gasoj jene: temas pri la substancoj defalantaj dum la homa agado, kiuj estas sub la kutimaj atmosferaj kondiĉoj /temperaturo kaj premo/ en la gasa stato.

Unu el oksidaj de sulfuro, nome sulfa dioksido /SO₂/, grand kvante estiĝas dum la forbruligado de sulfur-havaj materialoj kaj pro siaj efikoj estas unu el la plej gravaj malutilaj gasoj. SO₂ estas senkolora akre odoranta gaso, kiun eligas en la vivomedion precipe la elektro-centraloj uzantaj kiel energi-fontojn karbon aŭ nafton kun alta enhavo de sulfuro /en kelkaj ŝtatoj eĉ 90% de ĉiu aera SO₂/; aliaj fontoj de la defalanta SO₂ estas kelkaj metalaj farejoj, celulozo-farejoj /uzantaj t.n. sulfitan teĥnologion/, ĥemia industrio fabrikanta H₂ SO₄. Daŭraj efikoj de la malaltaj koncentrecoj kausas iridaton de mukozoj, konjunktiviton kaj bronĥiton.

Oni ankaŭ ekkonis la negativan efikon de SO₂ sur la ĝeneralan sanstaton de la homo /difektiĝo de la proteina kaj saĥarida metaboloj, misefiko sur hematopoezon, dento-kario/, kio povas subfosi lian imunecon. Altaj koncentrecoj povas kaŭzi eĉ la morton pro konvulsio de voĉkordoj kaj reflekse spirhalto /laborakcidentoj au dum la eksterordinare malfavora tersurfaca - temperaturo - inversio/.

SO₂ bone solviĝas en la atmosfera akvo, krom ĝi povas plu oksidiĝi. Tiel estiĝas aerosoloj de sulfita kaj sulfata acidoj kaj sulfa trioksido /H₂SO₃ H₂ SO₄, SO₃/, kiuj estas ĉefaj kulpantoj de acidaj pluvoj ofte falantaj sur la teritoriojn centojn da kilometroj for de la origina fonto.

Oksidoj de karbono estas ankau grand-kvante eligataj. Ajna brul-konsumado de organikaj substancoj produktas ĉi oksidojn, en la praktiko temas precipe pri la forbruligado de karbo kaj nafto en elektro-centraloj kaj vapor-farejoj, forbruligado de naftaj derivaĵoj en benzinaj kaj dizelaj motoroj k.s. Konsiderindaj estas ankaŭ loĝ-domaj fornoj. Ju malpli da oksigeno dum la brulado, des pli da karbona /mono/ oksido /CO/ estiĝas. Gi estas intense venena gaso, senkolora kaj senodora. Ĝia plej grava efiko estas la malfunkciigo de la spiropigmento - estigo de karboksihemoglobino, sed ĝi efikas ankaŭ sur la nervan sistemon. Mortigaj koncentrecoj povas okazi aŭ dum laborejaj averioj aŭ dum eksterordinare malfavoraj terenaj kaj atmosferaj kondiĉoj /inversio/. Diskutata estas ankaŭ la ĥronika veneniĝo studebla precipe ĉe fortaj fumantoj /iskemia kormalsano/. Perfekta brulado /kun sufiĉe da oksigeno/ donas precipe karbonan dioksidon /COg/, kiu el la strikte toksologia vidpunkto ne estas venena, ĝi estas normala produkto. de la spirado; tamen se iom altigitaj koncentrecoj ĝi efikas iom narkote kaj iom irite. Pli altaj koncentrecoj unue stimulas la spiradon, poste ĝin paralizante. La fakulojn maltrankviligas ankaŭ ĉianf grandiganta eligata kvanto da CO₂ pro ĝia ebla t.n. "forceja efiko", kiu povus kaŭzi gravajn ŝanĝojn de la klimato.

Oksidoj de nitrogeno, nome nitra /mono/oksido /NO/ kaj nitra dioksido /NO₂/ ne tiom gravas en la vivomedio kiel la supre menciitaj oksidoj. Ili estiĝas precipe kiel reziduaj gasoj el la brulado de karbo kaj naftaj derivaĵoj, iom malpli el kelkaj ĥemiaj fabrikoj /produktado de nitrata kaj sulfata acidoj/. Tamen ili kapablas konsiderinde kontribui al la acideco de gluvoj. En la industrio NO kaj NO₂ kutime estas kune, kiel ruste ruĝa iritanta gaso. Dum averioj ili povas kaŭzi pulman edemon aŭ penumoniton kun la fatala fino.

El la gasaj kombinaĵoj de halogenoj ekologie plej gravas hidrofluorido /HF/ kaj silicia tetrafluorido /SiF₄/, kiujn eligas precipe alumini-farejoj, produktoj de fosforaj sterkaĵoj kaj de t.n. ekstrakta fosfata acido, produktoj de fluoraj kombinaĵoj. Fluoraj gasoj grave atakas mukozojn, pulmojn kaj dentojn. La lezoj tre malbone resaniĝas. HF ĉefrolis dum la vivomedia katastrofo en la valo de la rivero Meuse, 1930.

La ceteraj neorganikaj gasoj precipe en la laboreja medio, ne tiom en la vivomedio ĝenerale. Kompreneble ankaŭ ilin medicino maldevas subtaksi. Tamen precipe pri dihidrosulfido /H₂S, sulfano/, karbona disulfido /CS₂/, amoniako /NH₃/, kloro /Cl₂/ kaj hidroklorido /HCl/.

El la organikaj gasaj malpuraĵoj ni nomu precipe hidrokarbonojn kaj ties derivaĵojn. Temas precipe pri la reziduoj de la brulado /elektro-centraloj, fornoj, motoroj/ aŭ pri la vaporiĝintaj organikaj solvenoj. Kelkaj el ili estas kancerogenoj eĉ en relative malaltaj koncentrecoj.

La ter-atmosferon malpurigas ankaŭ diseriĝintaj solidaj aŭ likvaj substancoj. Se la dimension de la solidaj aŭ likvaj eroj estas koloidaj, sub 1 mikrometro /la limo de ĝenerale akceptita/, oni parolas pri aerosoloj. Se en la aero troviĝas solidaj eroj temas pri fumo aŭ polvoj, likvaj eroj formas nebulojn. Tiuj eroj povas ĝeni ne nur kiel simpla malpuraĵo, ili gravas ankaŭ el la medicina vidpunkto. Se la solidaj eroj havas akrajn eĝojn, ili povas igi etajn multnombrajn vundetajn en la mukozoj de la spirvojoj, ankaŭ la gutetoj de acidoj povas lezi la mukozojn; tiamaniere malfermiĝas la vojo por infektoj. En aŭ sur eroj de aerosoloj povas sorbiĝi fiziologie efikaj substancoj /ekz. kancerogenaj hidrokarbonoj, toksaj metaloj/, eventuale la eroj estas toksaj per si mem. Gravas ankaŭ la fakto, ke ju pli malgrandaj estas la eroj, des pli facile ili penetras en la organismon tra la spirvojoj, eventuale eĉ rekte tra la mukozo aŭ haŭto.

2. Vojoj al la plibonigo de la stato

El la antaŭaj linioj videblas, ke la plej intensaj malpurigantoj de la aero estas la energi-centraloj kaj trafikiloj, kiuj uzas kiel energi-fonton karbon aŭ nafton, resp. ties derivaĵojn. Karbo, nafto, eventuale ter-gaso, kiuj cetere povus esti valoregaj krudmaterialoj por ĥemia industrio, estas forbruligataj kun nealta efikeco kaj transformataj en CO₂, SO₂, CO, NO, NO₂ kaj aliajn reziduojn, pli-malpli danĝerajn por la vivomedio. Barbaraĵo el ajna vidpunkto!

Por la plej proksima estonteco estas studataj kaj proponataj diversaj procedoj por la sensulfurigo de karbo aŭ nafto antaŭ ilia forbruligo kaj teĥnologioj por la farigado de la rezuduaj gasoj /diversaj sorbiloj, resp. ĥemi-sorbiloj/. En la artikolo pri la aero mi jam menciis, ke sufiĉe bone solvitaj estas diversaj senpolvigaj aparatoj. En la vidpunkto de pli malproksima estonteco tamen temas pri pli-malpli provizoraj solvoj. La definitiva solvo estas aliaj, t.n. alternativaj energi-fontoj. Kelkaj el ili jam nun estas sufiĉe bone studitaj kaj uzataj: ekz. energio de akvo /riveroj, tajdo/, tervarmo. Multaj pluaj estas studataj kaj provataj: sun-energio /ekz. sunkolektiloj aŭ sunĉeloj/, vent-energio, bio-energio /transformado de organikaj defalaĵoj en bruleblan gason kaj sterkaĵon/. Bedaurinde, almenaŭ kelkaj landoj ne povos eviti ankaŭ la atoman energion, cetere ĉi tiu energio estas por la vivomedio malpli danĝera ol karbaj energi-centraloj, se oni rigore plenumas ĉiujn regulojn de la labor-sekureco kaj teĥnologia disciplino /tion mi kuraĝas deklari eĉ post la Ĉernobila katastrofo/. Neniu el la prezentitaj "puraj" alternativaj energi-fontoj estas universala unu sola solvo, oni devos uzadi ĉiujn eblajn oportunajn fontojn, ĉiam serioze observante iliajn eventualajn efikojn sur la vivomedio kaj la homa sano.

En la trafiko oni devos transiri, iom post iom, al la pli pura energio-elekto. Fer-vojoj tion jam faras, la estonteco de elektromobiloj kaj aliaj elektro-trafikiloj dependas precipe de la evoluigo de sufiĉe efikaj kaj malgrandaj elektro-akumuliloj aŭ piloj.

En la ĥemia, metalurgia kaj aliaj industrioj ne estas alia vojo, ol transirado al la sendefalaĵaj teĥnologioj ankaŭ rilate al la atmosfero. Tio postulos perfektan hermetigon de la aparatoj, recikladon kaj prilaboradon de ĉiuj reziduaj, "defalaj", gasoj kaj aerosoloj. La teĥnologioj devos esti perfekte fermitaj cikloj ankaŭ en la rilato al la atmosfero.

La vidpunkto de la vivomedio devos esti samvalorigita kiel la ekonomia vidpunkto, se ne preferita.

VI-a IMEK /Internacia medicinista Esperanto Konferenco/
K R A K O W / 9. 7. 87 /dimanĉo/ - 24.7.87 /vendredo/

Interkona kaj adiaŭa vespero. Riĉa programo. Prelegserioj. Ekskursoj al Oswiecim kaj Wieliczka.

Konferencaj temoj:

1. Nuntempaj atingoj de medicino kaj farmacio.
2. Preventado en ciutaga kuracista praktiko.
3. Fitoterapio en nuntempa medicino.
4. La aktuala temo proponita de la Monda Organizo de Sano.
5. Liberaĵoj /medicina fakterminaro, kuraciloj, medikamentoj/.

Ekspozicio pri pasintaj IMEKoj. Vizitado de krakowaj objektoj. /medicinaj/. Afiŝe sesio /"posteroj"/.

Partoprenkotizo: 14000,-zl. /=loĝado, manĝado, scienca, kultura kaj turisma programoj.

Konferenckotizo /kroma/ aparte: ĝis fino de aprilo 4.000,- zl
post 30a aprilo 5.600,- zl

Aliĝiloj, informoj: Włodzimierz Opoka, str. Luzycka 65/13, 30-658 Krakow, PL
Al partoprenantoj el Cefioslovakio: Se vi bezonas lingvan korekton de via referaĵo, sendu al
MUDr Hradil J., 29501 Mnichovo Hradiště 718

La jaro de Purkyně /elparolu Purkinje/.

En decembro de tiu ĉi jaro pasos 200 jaroj depost nasko de nia genia natursciencisto Jan Evangelista Purkyně /plue Purkinje/. Liaj esploraj rezultoj en fiziologio, fiziologia farmakologio, histologio kaj embriologio estas laŭ tutmonda mezuro principaj, kaj tial lia ducentjara jubileo estis envicigita en la kalendaron de UNESCO.

Purkinje estis ne nur elstara sciencisto, malkovranto, entuziasma altlerneja instruisto, scienca organizanto, sed ankaŭ poeto, tradukanto, kunfondinto de bulteno de ĉeĥaj kuracistoj kaj Asocio de ĉeĥaj kuracistoj, populariganto de scienco kaj publika aganto. En sia vivo /1787-1869/ li instruis en Breslau /1823-1850/ kie li proklamis sian ĉelan teorion, kaj en Prago, kie li enviciĝis inter renaciigistojn kaj preparis malfermon de la ĉeĥlingva medicína fakultato de universitato de Karolo.

Pri genieco de tiu ĉi granda naturscienco atestas trarigardo pri lia scienca verko. Li estis la unua, kiu per mikroskopo esploris konsiston de la histoj, li unua nomis vivan materion en la celoj protoplasmo, studis influon de akcelo sur homa organismo, li estas fondinto de daktiloskopio. li unua konstatis, ke la glanduletoj de stomako eligas substancejn necesajn por digestado, li estas malkovrinto de nukleo de ova ĉelo en ovario, li studis cilian movon, aeran kaj ostan kondukon de sono kaj ambaŭorelan aŭdon, artikulacion. Li proponis mezuradon de malmoleco de korneo, modifis optometran, enkondukis biomikroskopion de la okulo, metis teoriajn kaj praktikajn bazojn de oftalmoskopio, priskribis sekvantan kontraston, konstatis adaptajn ŝanĝojn de la vido, studis okulmovojn ktp.

Kelkaj bazaj fiziologiaj nocioj portas lian nomon: kor-fibroj de Purkinje, aksono de Purkinje, fenomeno de Purkinje kiel ŝanĝo de kolora vido dum sango de intenseco de primulado, figuro de Purkinje sur okulfono, bildetoj de Purkinje montrantaj lumrompajn areoj de la okulo, sekvanta bildo de Purkinje, embria veziketo de Purkinje /nukleolo de la ova ĉelo/, vertiĝa leĝo de Purkinje, resona spaco de Purkinje. Liaj verkoj kaj ideoj estis agnoskataj en la tuta mondo. Krom alia li estis dum sia vivo nomumita membro aŭ koresponda membro de la Akademioj en Berlino, Petrogrado, Londono, Vieno kaj Parizo.

Ĉeĥoslovakia Akademio de sciencoj solenos en la tagoj de 26a ĝis 30a de aŭgusto 1987 la jubileon per internacia scienca konferenco kun terno: J.E.Purkinje en scienco kaj kulturo, Ĉeĥa medicinista asocio de J.E. Purkinje okazigos solenan sciencan konferencon en la tagoj de la 9a ĝis 13a de novembro. La senco de tiu ĉi konferenco estos ne nur taksado de la malkavroj de Purkinje en la hodiaŭa vidpunkto kaj iliaj kontribuoj por medicino; sed ankaŭ sumi sukcesojn kaj atingiĝojn de disvolvo de niaj socialismaj sanitaraferoj kaj iliajn perspektivojn.

La solenaĵoj de ducentjara jubileo havos antaŭ ĉio laboran karakteron. Ĉiuj instigaj pripensoj, al kiuj nin J.E. Purkinje ĉijare gvidos, denove nur atestos pri senmorteco de lia vivoverko.

KONFIDA TELEFOHO EN KALISZ

Helena Wegrzyn

Rapide kreskanta en la mondo kvanto da suicidoj kauzis, ke la angla pastoro Chad Varah, revenante kortuŝita post enterigo de la dekokjara memmortigantino, decidis oferi ĉiujn fortojn, siajn fortojn, siajn spertojn kaj rimedojn por helpi la homojn, kiuj ne scipovas mem solvi siajn problemojn. En la

1953-a jaro prokraste li propagandis en ĉiuj publikaj lokoj kaj trafikiloj jenan anoncon: "Se vi volas vin memmortigi, telefonu antaŭe al mi". Li aldonis sian privatan telefonnumeron kaj ekde tiam komenciĝis liaj interparoloj kun memmortigantoj. Pere de telefona interparolo li analizis kune kun la interparolanto motivojn kiuj igis lin fari la ekstreman decidon, klopodis dum la interparolo tiun ĉi temon provizore flankenŝovi kaj samtempe montri al li la veran individuan vivosencon.

La iniciato de Chad Varah subtenis multe da urboj en Anglujo, sekve ĝi alvenis Eŭropon, por ke finfine ampleksu ĉiujn kontinentojn. El inter la socialismaj landoj la unua subtenis la iniciaton pri Konfida Telefono Ĉeĥoslovakio, poste Hungarujo kaj Pollando /en 1967 prof. d-ro Adam Bukowczyk en Vroclavo.

Chad Varah agis laŭ la maksimumo: "Estas nenio pli grava nek pli bela ol savo de la homa vivo". Rekompence por lia agado li estis honorigita per la medalo je la nomo de Albert Schweitzer. Efektive, dank'al sia iniciato suikidkvanto en Grandbritujo malgrandiĝis je 1/3 kaj plu eatas ĉiam pli malgranda.

Grade, la problemaro de aferoj tuŝataj dum KT-interparoloj disvestiĝis kaj ampleksia preskaŭ ĉiujn domenojn de vivo kaj interhomaj rilatoj.

Post la dua mondmilito rimarkeblis en Pollando, samkiel ankaŭ en aliaj landoj la migrado de la vilaĝloĝantaro al urboj. Tio ĉi kaŭzis multfoje la adaptajn malfacilaĵojn, kio sekve influis al interpersonaj rilatoj, karakteriziĝintaj per plimultigo de konfliktoj familiaj, geedzaj, laborejaj kaj lernejoj. Krome, ankaŭ en Pollando ekzistas la problemoj de alkoholismo kaj narkomanio.

Tiuj kialoj kaŭzis egan bezonon krei ian "establon" kiu helpus homojn ne povantajn memstare plenumi la postulojn de la vivo.

En Pollando ekzistas multaj KT-oj pretaj helpi homojn, kiuj la helpon bezonas. Estas diversaj telefonoj direktitaj al elektita domeno, kiel "Junulara KT, *KTW" /venerologia/ k.t.s. Tamen Konfidaj Telefonoj ampleksantaj ĉiujn homajn vivproblemojn estas nun en Pollando 21, kiuj estas ariĝitaj en Koordina Komitato. Tiu Komitato organizas instruadon, kursokonferencojn kaj simpoziojn, en kiuj oni intersanĝas proprajn, rimarkojn, kaj elprofitas la spertojn de aliaj filioj de KT.

Menciitaj kontaktoj estas valoregaj. Aldone La Landa Koordina Komitato estas kontaktilo inter KT kaj IFOTES - La Internacia Federacio pri Telefona Helpejo kun la sidejo en Genevo, kiu estas kreita en komenco de la sesdekaj jaroj. IFOTES kunordigas la laboron de KT-oj el ariĝitaj landoj, organizas ĉiun trian jaron internaciajn kongresojn, gvidas instruadon kaj eldonas ege valorajn por ni bultenojn.

Antaŭ ol mi preparolas la temon de la Konfida Telefono en Kalisz, kelkaj informoj pri nia urbo kaj vojevodejo. Kalisz /Kališ/ estas la plej malnova urbo de Pollando, kies nomo estis menciita en la II-a jarcento de Ptolemeo. La urbo troviĝas sur la antikva "sukcena vojo" gvidanta el Balta Maro ĝis la Roma Imperio. Nun estas Kalisz la vojevodeja urbo kalkulanta super 120.000 da loĝantoj. Ĝi estas industria, administracia kaj scienca centro.

La Kalisz-a KT estas organizata far de du kaliŝaj sociagantoj: la kuracisto-ginekologo kaj magistro-psikologo, ĝis nun deĵorantoj en KT, demonstrante en sia laboro riĉan sperton kaj egan agadpasion.

Ĉijare ni festas la 12-an datrevenon de KT agado. Nuntempe en nia KT deĵoras 6 personoj: 3 kuracistoj, unu psikologo kaj du personoj el ekster la sanservo. Deĵorojn oni plenumas laŭ principoj de sociogado. Ni havas ankaŭ konstantajn kontaktojn kun du juristoj, kiuj socie donas juristajn konsilojn al niaj petantoj.

La mecenato de Kalisz-a KT estas la Vojevodeja Hospitalo, kiu donis kabineton, telefonan kaj financajn korespondadon.

Akorde al determinoj de IPOTES nia KT klopodas doni helpon al ĉiuj, kiuj ne povas elteni ŝarĝojn de la vivo. Ofte telefonas al ni homoj kiuj perdis kredon je la vivosenco. Ni oferas al ili precipe multe da atento. Interesas nin la problemoj kiun la telefonanto ne povas mem solvi. Dank'al telefona kontakto ni obtenas pli sincerajn elparolojn de niaj interparolantoj, kiel ankaŭ la eblecon de ilia pli profunda malfermiĝo same anonima deĵoranto.

En plimulto da kazoj ni sukcesas akiri la emocionalŝarĝigan staton. La telefonantoj komencas preskaŭ ĉiam interparoli streĉige kaj restas ofte trankviligitaj kaj eĉ dankemaj pro elaŭskulto de iliaj aferoj.

Multaj telefonantoj konfesas al KT siajn konfliktojn familiajn, laborejajn au mediajn. Certaj interparolantoj petas jurajn konsilojn. Multaj telefonoj devenas el familioj de alkoholuloj.

Ni gvidas kun ili longajn interparolojn klarigante, ke alkoholo lisme estas longdaŭra, kronika malsano, kaj ke la malsanulo bezonas nepre kiel eble plejan prizorgon kaj kuracadon en la dekuti-miga establiĝo.

Al ni turnas sin ankaŭ gepatroj havantaj klerigajn malfacilaĵojn koncerne al siaj geinfanoj. Ni interparolas longe kun ili, laŭbezone direktante ilin al Psikologia Konsultejo.

Telefonadas al ni ankaŭ homoj solecaj, por kiu KT estas anonura ebleco por interŝanĝo de pensoj aŭ impresoj kun la dua homo.

Ni klopodas ĉiun interparolon trakti serioze, eĉ se iu telefonas al ni por ŝerco /kio okazas temp-al-tempe/. Tamen efektiviĝas kelkfoje, ke la interparolo "pri nenio" transformiĝas en la helponpeto pro iu grava vivproblemo.

Jen kiel motivas la agadon de KT-oj la eminenta sociologo Alain Touraine dum la VIII-a Kongreso de IFOTES en Reims en la 1979-a jaro: "Vi renkontadas vian interparolanton, kiu estas ano de la sama socio en la momento kiam li havas jam neniajn rilatojn kun aliaj homoj, kiam ĉiuj fadenoj ligantaj lin kun la mondo estas deŝiritaj. Vi renkontas lin en la vere fundo kaj vi enmanigas al li tiun gracilan fadenon, helpe de kiu li obtenas kunligan ne kun vi persone, sed kun si mem, kio signifas denovan akiron de enirpovo en kunligojn kun aliaj homoj /.../ En ĉi tiu mondo ekzistas danĝero ke ĝi ne estos jam plu la mondo da socioj, sed la mondo de ŝtatoj, aŭ amasoj. En tiu ĉi mondo vi gvidas la lukton kun absolutismo ne el supre sed alirimede-elaŭskultante homojn malfortajn en alia propra senforto. En ĉi tio troviĝas ia forto kaj konvinko de via agado"

Esperantigis: D-ro Andrzej Wegrzyn

Adreso de aŭtoro:

ul. Bogumila i Barbary 15 m 6, 62 800 Kalisz, Folando

El Sovetio:

En julio 1986 okazis en Litovio la 23-a Baltia esp. tendaro. En ĝia kadro estis organizata medicina E-konferenco, kiun gvidis Nikolao Sigajev el Ufa.

Entute estis prezentitaj 11 prelegoj. S-ano V.Prjaĥin el Minsko rakontis pri la movado de kuracistoj de la mondo kontraŭ nuklea milito dum la komuna kunsido de la somera universitato.

12-an, 13-an kaj 15-an de julio okazis sekcijaj kunsidoj. Dum la 1-a kunsido A. Vaitilavičius el Vilnius informis ĉeestintojn. pri pasintjara medicinista kunveno /BET-22, Estonio/ kaj prelegis pri konflikto inter mikroboj kaj civilizacio. Estis prezentitaj prelegoj de A. Judickiene /Vilnius/ - "Tion eblas eviti /kontraŭ kancera/ kaj de S. Vajinskij /Ĥarĵkov/ - "Diskuto pri fizikaj ekzercoj por sano". Dum la 2-a kunsido parolis S. Nikonov /Koŝtla-Jarve, Estonio/ "Aktualaj problemoj de medicina servo en minejsivistaj taĉmentoj", K. Olšin /Leningrad/ - "Problemoj de gerontologio" kaj E. Inokajtiene /Seia, Litovio/ - "Ne misuzu la rukacilojn". Dum la 3-a "kunsido prelegis E. Baranova /Ufa/ - "Sociaj kaj biologiaj sekvoj de alkoholismo", E. Glikman /Novgorod/ - "Aŭtogena trejnado kaj mi - "Influo de kateĥolaminergaj rimedoj al la efiko de imunostimulantoj" kaj "Akirita imunodeficienta sindromo".

Krome, okazis kunveno de medicinistoj pri organizaj demandoj, kie estis elektita labora grupo por aktivigi agadon de medicina sekcio de STK de ASE. La gemedicinistoj partoprenis ĉiujn tendarajn aranĝojn: pacmitingon, laboron por fonduso de Cerncerbilj, kronmetadon al soldataj tombejoj en

Smalininkaj kaj Jurbarkas, renkontigem kun militveteranoj, seminariojn de aktivuloj kaj de tradukistoj, koncertojn ktp.
Nikolao Ŝigajev.

Nova karacilo kontraŭdolora.

Laŭ D-ro Barták.

Prof. Henri Laborit el Hospital Beaucicaut en Parizo, konata malkovranto de neuroleptiko filorpromazino, anoncis novan inventon. Temas pri forta kontraŭdolorilo, kiu estas signata A.G.R.529 kaj ĝian mekanismon de la efiko la aŭtoro ankoraŭ vualas per sekreto.

Ankoraŭ longe daŭros, ĝis la medikamento aperos merkate. Unuaj eksperimentoj pri bestoj okazis sukcese. Laŭ sciigoj la A.G.R. havas la tutan aron da ecoj: ĝi efikas ne nur kontraŭdolora, sed kontraŭinflame, sedative, kontraŭepilepsie, kontraŭpsikoze kaj kontraŭstreĉa. Ĝis nun oni ne povas eviti, ĉu la medikamento ne havas tre malfavorajn apudajn efikojn. En la eksperimentaj kaj pruvaj laboroj do temos pri komparo de la efiko kaj risko. Nome nuntempe la fortaj kontraŭdoloriloj mildigas la doloron, tamen ili malaltigas cerbajn funkciojn kaj provokas apudajn efikojn, kiaj estas ekzemple tolerado kaj droge dependo. Farmakologo prof. Lhoste asertas, ke ĝis nun neniu esploristo trovis vojon, per kiu kiuajn forta kontraŭdolorilo estus liberigita de psikaj apudaj efikoj. En la teorio de la doloro eatas nun menciataj tri areoj.

La unua astas sintezo de "transniteroj", kiuj astas per kontraŭdoloriloj blokataj, per kio estas malaltigita percepto de la doloro eĉ dum inflamo. La dua areo estas kopiado de endorfinoj, kiuj estas naturaj morfinaj materioj, kiuj ligiĝas al centraj receptoroj. La tria vojo estas malkovro de tia substanco, kiu rapidas forigon de -al korpo naturaj substancoj - morfinaj enkefalinoj, kiu daŭras 30 sekundojn.

La malkovranto de A.G.R. proklamis, ke li malkovris la kvaran vojon kontraŭ doloro. Oni supozas, ke antaŭ ol estos finitaj klinikaj eksperimentoj, daŭros enkonduko de la medikamento en praktikadon proksimume kvin jarojn.

REFERAĴOJ

Libido post uterektomio. /Notabene medici 13,362,1985/

Pii granda nombro da virinoj post uterektamio estis observata en Belgio. Ĉe 80% estis libido post operacio sama kiel antaŭ ĝi, ĉe 20% estis pli granda kaj ĉe 20% mallevigita. La lasta grupo vivis antaŭ la operacio en strĉeitaj familiaj rilatoj. El la studo oni konkludas, ke subita ŝanĝo de la hormona statuto de la virino mem do ankaŭ en menopauzo - ne influas pli signife seksan konduton de la virino, se ne estas disturbita sia psika stato. La aŭtoro alplenigas tiun ĉi konstaton por konsolo de la virinoj, ĉe kiuj okazas malrapida cedo de seksaj funkcioj dum progresanta ago per la vortoj: Ĝi estas kompensata per profundece kaj intimeco.

Promesplena markero ĉe osteoporozo. /La Presse Médicale 15,643,1986/

Osteokalcin-o faras 15-25% de la osta matrikso. Montriĝas, ke ĝi estas unua specifa kaj santema marker-o de la sorbo de osta histo. Ĝia konstato en ŝero estas nun farata radioimunologie. Nun estas, prilaborata esploro de medikamentoj, kiuj surbaze de tiu konstato priinfluas inhibicie la produkton de la osta histo ĉe osteoporozo.

Ŝirmo de la cerbo. /Münchener medizinische Wochenschrift 128,7:32-33,1986/

Dum la 14a monda kongreso de angiologoj en Munkeno anoncis R. Frackowiak el Hemmersmith Hospital en Londono, ke laŭ konstato de lia esplorgupo la cerbo eluzas nur 40% de oksigeno kaj 12% de glicidoj, kiuj estaa enkondukitaj per sango en cerban histon. La reston de tiuj substancoj lasas la cerbo sen ŝanĝo kaj ne uzas kiel rezervon por la kazo, kiam la cerbo ne estus ŝirmita kaj ne

estus sufiĉe provizata. Lia laborgrupo uzas por la studo metodon "Positronen-Emmisions-Tomografie /tomografoe kun emisio de pozitronoj./ - PET.

La aparaturo PET povas videbligi ne nur metabolitojn sed ankaŭ trafluon de la sango tra la cerbo. Ĉe tio ĝi eluzas lumajn partikulojn -pozitonojn - kiuj ekestas dum disfalo de la radioaktiva substanco enŝprucigita en la sangon kaj el Akceptita radiado rekonstruas la bildon. La anglaj sciencistoj esploris ĝis nun per la metodo PET proksimume 300 pacientojn kaj dum tiuj esploroj ili konstatis ankaŭ nekompletan eluzon de alfluanta oksigeno. Laŭ ilia kalkulo povus tiu ĉi reservo ŝirmi la cerbon antaŭ perturboj de metabolismo tiam, kiam la alŝovo de la sango malleviĝus al la duono. Krom ĉi tiun ĉi metodon oni povos eluzi por kontrolo de la sukceso de ĥirurgia kuracado de la cerbo, precipe de perturboj de ĝia sangoprovizo.

Terapio per interferono. /Fortschritte der Medizin, 103, 16:14, 1985/

Uzante terapion per tiu substanco ĝis nun estis atingita la plej granda efiko de malignaj melanomoj. Dum la progresintaj stadioj de la malsano ĝi estas aplikate rekte en la tumoran mason. Dum kuracado, kiu daŭris 2 jarojn, estis atingita signifa plibonigo. Ankaŭ de hipernefromo, kiu estas taksata kiel nekurablebla, estis atingitaj sukcesoj, samkiel dum kuracado de malignaj limfomoj. Apudaj efikoj de la kuracado per interferono estas tolereblaj. Nur dum la unua semajno de kuracado aperadas febro, muskulaj doloroj kaj naŭzo. Ĉefa problemo estas post semajna aŭ kelkmonata kuracado aperanta korpa laco tia, ke la dozoj de interferono devas esti reduktita aŭ entute nuligita.

Akupunkturo ĉe bronka astmo. /Sovĕtskájá medicina, 2:77gis 80, 1985/

Spite ĝisnunaj sukcesoj de la klinika alergologio restas kuracado de tiu ĉi malsano daŭra problemo. Tio okazas ĉar unue kreskas daŭre nombro da gravaj formoj de astmo kaj tiuj, kiuj aŭ malbone aŭ tute ne reagis sur nuntempaj kuracaj procedoj. Apliko de kortikosteroidoj kaj bronkodilatiloj gvidas en kelkaj kazoj al akompanantaj komplikajoj tiel, ke estas serĉataj novaj aspektoj de efiko kuracado. Eĉ se la opinioj pri uzo de akupunkturo en unuopaj kazoj diferenciĝas, tamen tiu ĉi metodo gajnis certan pozicion en kuracado de tiel malsanaj unuopuloj. Estis sciigitaj spertoj kun grupo de 42 pacientoj kun infekta-alergia formo de astmo, kiuj estis hospitaligitaj surbaze de recidivoj de bronkito, kiu gvidis al malboniĝo de la baza astma procedo. La rezultoj konfirmis, ke uzo de akupunkturo havas en kadro de kompleksa kuracado de astmo sian signifon. Helpe de ĝi oni sukcesas rapide atingi optimalan traireblecon de bronkaj vojoj precipe en periferiaj partoj de pulso kaj efike malintensigi inflamajn procedojn en bronkoj.

Vemena serpentmordo /pediatrische Praxis, Suppl. I, e 152-155./

En la tuta mondo krom SU kaj Ĉinio mortas tiukaŭze jare 30-40 mil homoj, el kiuj plimulto el Azio, 3-4 mil el Suda Ameriko, 300-500 personoj en Norda Ameriko, en Europo 50-60 personoj jare kaj el ili duono en Francio. Laŭ ĉiuj ĝisnunaj spertoj tiu trafo estas mortiga nur ĉe malgrandaj infanoj kaj ĉe maljunaj personoj kaj ĉe tia mordo, kiam la veneno penetris rekte en la cirkulantan sangon. Precipe danĝera estas serpentmordo en vizaĝon, en kolon kaj en la brustan areon. En eŭropaj landoj temas nur pri vipuro, kiu bone aklimitiĝis eĉ en malvarmaj teritorioj kaj vivas ĝis al limoj de la polara cirklo.

Kora morto en Usono. /Selecta, 28, 1:40, 1986/

Korvaza morteco malleviĝis dum lastaj 20 jaroj je 38% kaj pri cerbofrapo eĉ pri 45%. Ankoraŭ ne estas klarigita la demando ĉu eblas klarigi ĉi tiun favoran fakton per pli malgranda malsaneco pri tiu malsano aŭ per progresoj en la terapio. Ĝisnunaj studoj ŝajnas montri, ke la terapio ĉi tiujn favorajn rezultojn negranda pli influas ol la malleviĝanta malsaneco.

Decido pri optimuma alteco. /Aktuelle Chirurgie 20,4:121-124,1985/

En stadio XV de arteria obstrukco de la ekstermajoj validas: regi infekton - revaskularizi - amputi tiel periferie, kiel eblas. Konvencaj kriterioj por decido pri alteco de la amputo montriĝas nesufiĉaj. Nove proponiĝas eblo de transkutana konstato de la loka oksigena tensio. Temas pri simpla metodo, laboranta kun precizeco pli alta ol 90%. Ĉe amputoj en subgenua parto necesas lima izobaro minimume 45 mmHg, por amputo en genuo aŭ femuro sufiĉas 35 mmHg. Depost la enkonduko de tiu metodo malleviĝis la nombro da amputoj en femuro kaj hodiaŭ ĝi faras nur 18,6%, amputo en genuo 23,3% kaj en kruro 58%.

FARMAKOTERAPIO DUM LA JARO 2000.

/Deutsche Apotheker-Zeitung, 12p,46: 2402-2405, 1985/.

Centropunkto de la eksterordinara intereso estas monoklonaj, kiuj jam hodiaŭ gajnis firman lokon en diagnozado kaj terapio de malignaj tumoroj. Grandaj esperoj estas metataj en monoklonajn antikorpojn kontraŭ tumoraj antigenoj kaj en eblon ligi ilin al celataj kancerostatikoj. En terapio de tumoroj daŭre mankas decida breĉo en ĝian strategion. Post multaj sintezaj kaj duonsintezaj produktoj estas nun provataj eĉ kelkaj naturaj materioj. Vico da ili jam estis preklinike esplorita kaj estas preparita por klinika uzo. Inter tiujn esperdonajn medikamentojn apartenas TAKSOLO, PHILLANTOSIDO, PACRATISTATINO kaj vico da aliaj, plue ankaŭ medikamentoj fabrikataj el mikroorganismoj kiel ekz. EŬINOMICINO, MENOGALORO aŭ APHIDICOLINO.

Český esperantský svaz
110 01 PRAHA 1, Jilská 10

NOVINY

Dohlédací pošta Praha 07
Snížený poštovní poplatek povolen
Ředitelstvím pošt Praha
J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6.4.1979